

Ludwig Kimme,

## Mia Nordernej'

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ho, Nordernej', mi amas vin  
El mia tuta kor'.  
Insulo mia, ravas min  
De l' ondoj la sonor'

De l' maro bru', de l' mevoj kri'  
Kaj shtormo-kant' en hhor'!  
Surkaje promenadas mi  
Kaj ghojas mia kor'.

Saluton, urbo en la mar',  
Che l' vasta maro-strand'!  
Post shtorm-rezista digo-bar'  
Sekura estas land'.

Kaj chiu, kiu devis de  
Vi disdeigi sin,  
Sopiras kaj esperas, ke  
Li ree vidos vin.

*Traduko de la Germana poemo "Mein Norderney" de LUDWIG KIMME (\*1907-04-07 – †1984-09-03) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1990.*

*MR-238-1 / Arg-597-1203 (2013-01-08 09:36:51)*